

Zone euro : 3,50 €
Autres pays : 4,50 €

Organe de l'Union des travailleurs espérantistes de langue française

www.sat-amikaro.org



*Espéranto : vers une culture sociale
sans frontières*



Tema número



PENSI AFRIKON

AFRIKO

p. 8

p. 5

VIRINA PIEDPILKO EN AFRIKO, vojo al sinliberiĝo

p. 9

RAPORTO PRI LA SENDO DE LIBROJ
AL ESPERANTISTOJ DE AFRIKO DUM 2018

p. 10

KIAM ESPERANTO KAJ SOLIDARECO KUNIĜAS

p. 11

La 1-a AFRIKA VIRINAKONGRESO DE VIRINOJ (AKVo)
okazinta en Moramanga, la 21an-28an septembro 2018

p. 11

AVE - AGADO POR KAJ PER ESPERANTO
POR SUBTENI DAŪRIPOVAN EVOLUON

p. 12

KIAL KAJ KIEL MI FUĜIS EL BELGA KONGOLANDO (RDK)

p. 13


KIA SOLIDARECO
INTER RIĈAJ LANDOJ KAJ AFRIKO ?

p. 14

Kaj ankaŭ : FINANCA RAPORTO 2018 *p. 4*

Por la okcidenta mondo Afriko 'ekzistas' ekde la periodo de la Grekoj, kvankam ĝi estis ĉefe konata pro la norda marbordo de tiu kontinento². La portugaloj 'ekmalkovris' la marbordojn okcidente, sude kaj oriente. Oni konas la sinsekvajn historion de la sklavokomercio, de la koloniado je pretekso de civilizanta farado (kaj evangelizado de la paganoj, de la 'prahomoj'). La pripensoj pri « Afriko » pligrandiĝas ĉe la afrikaj verkistoj ankaŭ post la malkoloniado dum la sesdekaj jaroj.

Mi ne scias, ĉu oni konas tiun deziron pripensi la 'aziecon' de Azio aŭ la 'amerikecon' de Ameriko, kiel oni faras pri la 'afrikaneco' de Afriko. En Eŭropo, pro la starigo de Eŭropa Unio kaj pro la ondoj da enmigrintoj ekde la sepdekaj jaroj, multaj homoj kontraŭstaras por defendi la 'eŭropajn valorojn', aŭ por klopodi ĉirkaŭlimigi la 'veran Eŭropon kaj ĝiajn valorojn', kiujn oni deziras meti en la konstituciojn aŭ en kursojn de civitismo.



Pensi Afrikon estas demando, ne nur kiel temo por romanoj kaj poeziaĵoj, sed ankaŭ por diskutoj en afrika filozofio. Interalie : kiel oni povas aŭ devas diferencigi la afrikan filozofion disde la okcidenta³ ?

Nu, ĉu ekzistas tiu okcidenta filozofio ? Ĉu ni parolu pri okcidentaj filozofioj, laŭ ilia historio (ekde la antikva Grekio ĝis la nuna epoko) kaj laŭ iliaj diversaj fluoj kaj branĉoj, disigitaj tra la mondo, kiuj eĉ influas la instruadon de la akademia filozofio en Afriko ?

Ekde la eldono de la 'Bantua Filozofio' de patro Pl. Tempels⁴, la diskuto pri la statuto de la afrika filozofio samrangas kun la diskuto pri la afrika spaco⁵ kaj pri la afrikaneco de tiu filozofio. La diskuto ne estas limigita per la afrikaj marbordoj sed daŭras en la eŭropaj ekskoloniantaj landoj. Ĝi okazas ankaŭ dum diskutoj en Usono, kie la sklavokomercio havas spurojn dum la pripensoj pri la identeco, kiel la rasapartigo en Sud-Afriko⁶. Iuj proponas la koncepton « Africana » por kunmeti la afrikanojn en la diasporon de Latin-Ameriko, de Karabio, de Usono, ...⁷

Ĉu oni devas iri en la malproksiman estintecon por trovi sian identecon ? Ĉu eblas trovi komunan identecon por ĉiuj Afrikanoj kaj Afrikaninoj, de nordo al sudo, de oriento al okcidento ? Ĉu oni povas fidi la verkojn de 'afrikanistoj' kiuj ĉiam rigardas

deekstere⁸ ? Kaj kion fari kun la lingvoj, kiuj venas el alia kontinento : la franca, la angla, la portugala, la nederlanda... ? Ĉu ili estas obstakloj por libere esprimiĝi⁹ ?

Ĉiu afrikano aŭ ne-afrikano, kiu spertis la afrikan kontinenton, konservas ankaŭ impresojn, ĉu pozitivajn, ĉu negativajn, ofte miksitajn.

Do, la teksto kiu sekvas fontas el persona sperto en Kongo (aŭ tiam Zairio) en 1980-1983 kaj en 1988. Same el restado en Mozambiko en 2007. Sed ankaŭ el legado de verkaĵoj de afrikaj filozofoj kaj el renkontiĝoj kun Afrikanoj en Eŭropo. Tiuj impresoj estu legataj kiel pentraĵo kun diversaj trajtoj kiuj estigas novan impreson de kuneco sen detaloj. Verŝajne estos la impresoj, kiun havos multaj personoj kiuj aŭdos (ĉefe !) aŭ kiuj legos la tekston. Estas ankaŭ invito al la aŭskultanto aŭ al la leganto por ke ili faru sian propran tekston aŭ pentraĵon.

Afriko

far Mireille Grosjean

Giganta bunta kontinento. Pli ol miliardo da loĝantoj. Peza pasinteco pro 300 jaroj da koloniado, kiu efikis kiel senrespekta cerbolavado. Abundo de lingvoj kaj diglosio – duidiomismo. Malapero de alfabetoj pro detruo fare de la koloniantoj. Tre riĉa kontinento. Se Afriko estus malriĉa, ĝi fartus pli bone, ĉar la mondaj potenculoj, ĉu politikaj ĉu ekonomiaj, malinteresiĝus pri ĝi. Nuntempe teatro de la tria mondmilito en orienta DR Kongo kun pli ol dek milionoj da mortintoj. Afrikecaj sociaj strukturoj, kiujn okcidentanoj penas kompreni ; konsekvence ili simpligas la aferon parolante pri « interetaj konfliktoj ». Afriko kun lokaj religioj misteraj aŭ importitaj kredoj. Afriko estas alia mondo, kie viro naskas kaj patrino helpas viron patriĝi. Ni el la Nordo kutimas paroli pri Afriko donante konsilojn kaj/aŭ helpojn, iri tien kun supera sento, el kio nenio pozitiva naskiĝas.

Ekde mia infanaĝo mi estis en kontakto kun afrikanoj en Svislando. Nigrulaj amikoj partoprenis mian geedziĝfeston. Mi legis diversajn franclingvajn verkojn el la afrika literaturo. En 2008 ILEI organizis sian Konferencon en Benino kaj mi decidis iri, finfine malkovri tiun kontinenton, esti tie, manĝi tie, flari la temperaturon kaj la humidecon, aŭskulti la lokulojn. Mi enorme timis. Mi supozis, ke mi devos tendumi en la flughaveno du tagojn antaŭ la ekflugo de mia hejmenreveniga aviadilo, por ne maltrafi ĝin. Supozeble la stevardinoj de Air France vidis tion, kiam ili akceptis min en Parizo en la aviadilo al Kotonuo. Unu el ili diris al mi : « Ĉu temas pri via unua vojaĝo al Afriko ? Jes ? Tamen vi vidis, vi ŝategos tiun lokon ! ». Kaj mi ŝategis kaj plu ŝategas.

Malkovri universalajojn estas mia emo, kiam mi vojaĝas. Mi estis en Maroko, Senegalo, Togolando, Benino kaj Burundo. Tie homoj havas du manojn kaj du piedojn, havas la samajn bezonojn, la samajn dezirojn, la samajn plezurojn, kiam aŭdiĝas bela muziko aŭ manĝeblas io bongusta, kiam aperas amiko por viziti vin. Gefratoj. Mi devis kuŝi dum kelkaj horoj en hospitalo en Kotonuo ; eble la tukoj en mia lito ne estis freŝe metitaj por mi ; ne gravas al mi ; certe iu antaŭa paciento estingis sian cigaredon en la tirkesto de la tableto apudlita ; restis tie brunaj rondaj makuloj ; ne gravas al mi ; venis flegisto kun injekciilo por piki min, la injekciilo estis malfermita antaŭ miaj okuloj, poste okazis la injekciado ;

gravas al mi. Jen la konsekvenco de tiom da vojaĝoj : mi konsciiĝas, kio gravas kaj kio ne gravas.

Kiam mi alvenis al Burundo en 2011 por instrui Esperanton, mi decidis neniam stari antaŭ sidanta grupo. Kaj tiel faris. Mi staris por solene malfermi la kurson kun Japhet Bayorin-tunzvenimana staranta je mia maldekstra flanko kaj Jérémie Sabiyumva staranta je mia dekstra flanko. Mi lernis iliajn nomojn, eĉ se mi ne komprenas la signifon de ili. Lerni la nomojn kaj nomi la homojn dirante iliajn nomojn estas la baza nepra respekto. Instruante mi sidis apud la unua tablo de unu el la du hufformaj duonrondoj. De la oka matene ĝis la sesa vespere kun manĝopaŭzo. Dum ok tagoj. Ni parolis kune, interŝanĝis informojn, ideojn, diskutis abunde. Aperis temoj kutime tre tabuaj en Afriko kiel ekzemple samseksemo. Do fido kreskis inter ni. Mi disdonis teon en iliaj tasoj prenante la poton el la manoj de la servistino : surprizo por ĉiuj. Por mi ne, ĉar en mia kapo kaj en mia koro mi scias kaj sentas, ke ni ĉiuj apartenas al la sama homa familio. Mi ne apartenas al iu afrika hierarkio, mi estas eksterulo, mi foje malrespektas la kutimojn ; sed ĉiam sen avantaĝo por mi sed kun avantaĝo por ili. Mi suferas, kiam mi estas honora gasto en afrika familio, kaj mi ne rajtas porti mian teleron al la kuirejo por helpi post la manĝo. Ĉiu estu en sia loko, en sia rolo. Ne facilas adaptiĝi...

Venas al mi abundaj monpetoj. Mi devas klarigi kaj rifuzi. Komprenable mi estas riĉa kompare kun ili. Sed la prezoj en Svislando estas tre altaj ; ni devas konsideri la diferencon inter enspezoj kaj elspezoj ; tie vidiĝas riĉeco aŭ ne. Mi neniam posedis domon. En Svislando mi luas apartamenton. Afrikanoj ne povas kredi tion. « Vi estis instruisto ! Do tutcerte vi posedas vian domon ! » Ne. Multaj afrikaj esperantistoj estas solidaraj kaj akceptas georfojn, edukas genevojn, helpas en sia vilaĝo. Kelkaj inventas prizorgadon de georfoj kaj petas monon al ni Norduloj. Multaj okcidentaj esperantistoj subtenas afrikanojn. Multaj okcidentaj esperantistoj plendas pri tiuj eternaj monpetoj. Mi neniam donas monon. Mi alportas librojn, gazetojn en Eo. Mi repagas vojaĝon, rekompensas laboron, kontribuas al konkretiĝanta agado. Mi organizas kursojn en Kotonuo kun lertigado de virinoj en gvidaj roloj, enkonduko en la skribado kaj legado de la fonua lingvo, la loka lingvo, kaj instruado de Eo. Tiuj kursoj por universitatnivelaĵ virinoj inter 18 kaj 30-jaraj estas granda sukceso. Mi provas



BI ANEB Sud Kivu (2011)




AKE 4 membroj de AK (2013)

arigi la monon por inviti dudek el ili por endoma staĝo plensemajna en la kulturcentro Joca en Kotonuo. Granda defio. Tie, kadre de NRO « Scio Sen Bariloj », mi donas miajn sciojn, mian energion, mian amon al ili. Kaj aperas junaj esperantistoj talentaj kaj motivitaj. Espereble mi trovos monfontojn por refari tian kurson en 2019.

Kia povus, devus esti la rolo de SAT-amikaro en Afriko ? Jam SAT-amikaro eldonas lernolibrojn kaj vortarojn kaj donacas ilin malavare al afrikaj esperantistoj.

Plie SAT-am devus nutri niajn kolegojn tie per varbaj tekstoj pri Eo, informaj tekstoj. Komprenoble ni devas novpensi la argumentojn, ĉar afrikanoj ne povas vojaĝi kiel ni vojaĝas. Sed multaj havas retaliron kaj povas havi virtualajn renkontojn. Flegi kontaktojn kaj informi afrikanojn pri la retejo <http://www.sat-amikaro.org/>, kie oni trovas abundon de interesaj tekstoj uzablaj en la franclingvaj afrikaj landoj. Laŭ la kriterioj de Schengen afrika fraŭlo sub tridek ne rajtas veni al Eŭropo. Do ni iru al Afriko ! Rekta kontakto samnivela (je la alteco de la okuloj, kiel diras germanlingvanoj ; sur la sama piedo, kiel diras franclingvanoj). Ni lernu unu de la alia, ni respektu unu la alian, ni forviŝu la stereotipojn. Ni kreu harmonian kunvivadon gebrate. Jen la celo de fizika renkontiĝo.



Lafi Charles Diatta, Antoine Gomis, Assane Faye (2013)



Renaskiĝo de BEA estraro Tchikpe Hounkpe Gobi Francis Joseph Tchikpodo Alofa (2017-12-17)

Bonvolu legi

<https://mirejo3.blogspot.com/2018/11/joca-kotonuo-nesto-de-esperantistoj.html>

<https://mirejo3.blogspot.com/2015/02/sevi-cotonou-benin.html>

<https://mirejo3.blogspot.com/2015/01/fonualingvo-esperanto.html>

https://eo.wikipedia.org/wiki/Scio_Sen_Bariloj

<https://eo.wikipedia.org/wiki/JOCA>

Virina piedpilko¹ en Afriko vojo al sinliberiĝo

La oka **Virina Piedpilka Mondpokalo**² okazos en Francio de la **7-a de junio ĝis la 7-a de julio 2019**.

La amasinforma eĥo, kiun tiu ĉi evento estigos, estas tute probable kaj signifoplena : ĝi komprenoble spegulas daŭran intereson pri piedpilko, sed ankaŭ, laŭŝajne, pri tuta entuziasmo por la praktikado de tiu fama sporto fare de la virinoj, pri ilia sindonemo en altnivela konkurado en kiu niaj « **trikolorulinoj**³ » famiĝis, interalie gajnante en 2011 la 4-an vicon okaze de la Futbala Mondpokalo en Germanio. Kaj ni ne dubas, ke niaj delegitinoj tutkore strebos por brile sukcesi venontokaze.



Gabrielle Onguene de Kameruno (foto : wikipedia)

Sed, se entute la virina piedpilkado mondscale famiĝis, aparte en Eŭropo kaj Francio, indas substreki kaj gratuli la disvolviĝon de la afrika virina piedpilko, altinivele praktikata en stadionoj, kiu jam de kelkatempe altiras spektantojn kaj subtenantojn. Tion reliefigas interalie la kreado de la Afrika Ĉampionkonkurso de Virina Piedpilko, kiu fariĝis, laŭ decido de la plenumkomitato de la Afrika Piedpilka Konfederacio, la Virina Afrika Piedpilka Pokalo.

En tiu konkurso, la teamo de Niĝerio aparte riveligis, gajnante dek unu el la dek tri Afrikajn Pokalojn ĝis nun organizitajn. La lasta konkurso okazis en Ganao en 2018.

De tiam, la virina piedpilko havas gravan videblecon en amas-komunikiloj, precipe en Kamerunio, kies teamo estis vic-ĉampiono de Afriko en 1991, 2004, 2014 kaj 2016, kaj venkinto de la Afrika Pokalo en 2011.

Antaŭ proksimume dudek jaroj, junulinoj, kiujn futbalo pasiigis, danke al sia entuziasmo, kontribuis al la disfamiĝo de la virina piedpilko en Afriko.

Notindas ke virinoj – kaj do ankaŭ en Afriko – pli kaj pli interesiĝas pri futbalo kiel spektantoj. Tial ŝajnas tute logike, ke ili fariĝas aktivaj praktikantoj de tiu sporto.

Ni do instigu la « gravulojn » por ke ili lojale kontribuu, interalie sur tiu ĉi kontinento, por plifaciligigi egalecon kaj emancipan integriĝon de la virinoj en tiu internacia sporto, kiu havas la avantaĝon kunigi naciojn kaj popolojn.

Ni esperu, ke tio ankaŭ kunefikos por kunigi virojn kaj virinojn okaze de internaciaj renkontiĝoj en la tuta mondo.

¹ *aliloke tradukita futbalo (football)*

² *pokalo: honorvazo donita al venkinto en ludo ; pokalumado : Porpokala ludado*

³ *Oni parolas pri la Francaj piedpikulininoj ludantaj por la tri koloroj de la franca naciflago (blua, blanka, ruĝa)*